
Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2017 | n-ro 09-10 (1347-1348)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

## Antaŭ unu jarcento en Balkanio blovis militaj ventoj...







## ...kaj ĉijare kongresaj ventoj

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Kanzono de Brigitte Fontaine (2009)

Ĉar mi vidis, ke S-ulo interesiĝas ne nur pri klasbatalaj temoj, sed ankaŭ pri la problemoj de individuaj liberecoj en la socio, mi pensas, ke eble konvenos la publikigo de tiu tradukaĵo, aktualeca kanzono de Brigite Fontaine:

## Malpermeso

Trajnkarton maljunulan mi
Montregis al la porka ul'
Kun lia obscena ekridet'
Al mia sirena siluet'.

*Rekantaĵo:*

Mi maljunas, kaj bugras vin,
Kun de libelo la aspekt'
Kun maljun', jes mortontas mi,
Forgesita jam detalet'

Bastardoj for de mia vid'!
Al trinkvagono iru tuj!
La cigaredon ekfumos mi
Kun kvieto en necesej'.

Ĉie regas malpermeso,
Alkohol' en televido,
Legitimaĵoj, monmanko,
Maljuni en publiklokoj.

Ĉie regas malpermeso
Parol', skribo, seksumado,
Ne da ĉuro sesdekuloj!
Alie skandal' kaj ridaĉoj.

*al la Rekantaĵo*

Malsanuloj prohibitas,
Enfosaĵen forĵetiĝas,
Krom se enspezigas monon,
Financadas la riĉulojn.

La maljunuloj rubujen!
Al kadukej', forgesejen.
Jen kio ja atendas min,
Se iam mi perdos vojon

Planojn aliajn havas mi
Planas fiki, drinki, fumi,
Ĉielojn elpensi novajn
Pli ampleksajn kaj pli ravajn.

Mi maljunas kaj bugras vin,
Kun de libelo la aspekt'
Kun maljun' kaj sen leĝ' ulin'
Se mortos mi, 'stos pro la ĝu'.

*Esperantigis R. Platteau*


*Novembro 2013*

**El la SAT-Administrejo**

# Plia kandidato por la PK.

**Guy Cavalier (31976):**

SAT-ano ekde 1972, membro de la PK ekde 1981, partoprenis en la organizado de SAT-amikaraj kaj SAT-kongresoj, pacisto kaj prizorganto de ĉiusemajna Pariza Esperanto-elsendo.



## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen, kun bedaŭrinde rekorda malfruo, la septembro-oktobra numero de Sennaciulo. Kun ĝi estas ekspedita la referendumilo, grava ilo por ebligi al vi decidi, kiuj plenumos la ĉefajn administrajn taskojn dum la venontaj tri jaroj, kaj kiu kontrolos kaj konsilos tiujn plenumantojn. Tamen ne nur per balotilo eblas influi la asocian vivon. Ankaŭ via ĉiuforma partopreno gravas por ebligi glatan asocian funkciadon. Frua kotizpago ŝparigas tempon al perantoj kaj ĉiuj, kiuj helpas kolekti la monon bezonatan por la komunaj aktivaĵoj. Nutrado de Sennaciulo, ankaŭ pere de mallongaj informoj pri via loka agado, gravas por informi pri la asocia vivo en diversaj mondopartoj. Kaj ĉefe, nun vere necesas freŝaj fortoj por pliefikigi la redaktan kunordigadon. Unua simpla paŝo, por prepariĝi al iama transpreno de tiu ĉi tasko, povas esti partopreno en la redaktoskipo kiel korektanto. Por tio ne necesas havi lingvonivelon de akademiano. Ĉiu povas kun iom da atentemo korekti simplajn tajperarojn, aŭ serĉi bildon por ŝtopi blankan spacon en iu paĝo.

Se ni vere ĉiuj deziras krei pli egalecan mondon, la unua paŝo certe estas pli vaste dispartigi la farendajn taskojn inter ni. Pensu pri tio, antaŭ la nunaj aktivuloj plene elĉerpiĝos.

La redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 1-2/2018 (1349-1350) : 28a de februaro

Sennaciulo 3-4/2018 (1351-1352) : 31a de marto

# Enhavo

Enhavo


### Tra la Mondo - Kurdio
4 "Oni min arestis kiel averto por la fremdaj vizitantoj"
5 Ni iros kune al la batal'... Eduarde ELDAROV

### Tra la Mondo - Orient-Eŭropo
6 Koncize
6 Eŭropaj judoj mallaŭdis Latvion Grigorij ANTONOV
7 Pollando rezistas Pascal Dubourg Glatigny
9 Oni diras ke islamanoj minacas Okcidentajn Moralojn, sed kio estas Okcidentaj moraloj? Robert NIELSEN
11 Korano Viviane TITS
11 Filipinanoj protestas kontraŭ ASEAN, Trump Albert Stalin GARRIDO

### Tra la Mondo - Orienta Azio
12 Originala projekto en Grekio: Ĥora

### El la SAT-Administrejo
13 Financa bilanco de SAT-Kongreso en Seulo

### Sindikatismo tutmonda
14 Belorusio: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikataj gvidantoj
14 Kartvelio: Ĉesigu la kontraŭ-sindikatajn persekutojn en la entrepreno Rustavi Azot
14 Minimume malgranda laborsalajro Sergej VLADIMIROV
15 Tamen, Noruzo
17 La noruzo de 2017 en Kurdio

### Ekologio kaj mediprotektado
18 50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio HORI Jasuo

### Beletro
2 Kanzono de Brigitte Fontaine (2009) R. PLATTEAU
20 Romano Tur-strato 4 en germana traduko Uwe STECHER
21 Monaj ĉifonoj (5) Espopore

### El la LEA-oj
23 Eĥo ekster Esperantujo de la apero en Hispanio de esperantlingva verko Miguel FERNANDEZ

### Liberecana Frakcio
24 Anarki-sindikatistoj esprimiĝas pri la situacio en Katalunio
25 Komento de la Liberecana Frakcio de SAT Liberecana Frakcio

### El la SAT-Administrejo
25 Novaj aliĝoj
28 Perantoj, Kotizoj, Donacintoj
31 Kandidatoj por la Ĝenerala konsilantaro de SAT
2 Plia kandidato por la Plenumkomitato de SAT

### El la leterkesto
26 Re-ree pri referendumo Pedro SANZ
26 Rerereage Kani

### Nekrologo
27 Yamasaki Seikô, Paul Signoret, Marjorie Boulton

### 91a SAT-kongreso
29 Turisma programo de la 91-a SAT-kongreso en Kragujevac


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***